# *Vizito de Obama al Kubo: respekti la diferencojn kaj krei bonfaran rilaton por amba? popoloj.*




Per editorialo publigikita en la gazeto Granma, oficiala organo de la komunista partio de Kubo, pri la vizito de la prezidento Barack Obama inter la 20-a kaj 22-a de marto , la insulo ratifas la volon avanci en la rilatoj kun Usono, surbaze de la principo-observo kaj celoj de la ?arto de UN kaj de la Proklamo de Latinameriko kaj Karibio kiel Paca Zono.

La gazetartikolo emfazas ke “por normaligi la rilatojn kun Usono estos esenca la ?esigo de la ekonomia, komerca kaj financa sie?o kiu provokas senigojn al la kuba popolo kaj estas la ?efa obstaklo al la evoluo de la insula ekonomio.

“Aliaj temoj kiuj vundas la suverenecon kuban anka? devos esti solvitaj. La teritorio okupata de la militbazo usona en Guantánamo, kontra? la volo de la registaro kaj popolo, devas esti redonita al Kubo, plenumante unuaniman deziron de la kubano de pli ol cent jaroj. Oni devas elimini la enmiksi?ajn programojn celantajn provoki malstabiligajn situaciojn kaj ?an?ojn en la politika, ekonomia kaj socia ordo de la lando.La politiko de “re?im?an?o” devas esti definitive entombigita”, precizigas la gazeto Granma.

Same oni asertas en la artikolo ke “Usono devas forlasi la intencon fabriki opozicion politikan internan, pagitan per la mono de la usonaj kontribuantoj. Devos anka? ?esigi la radiajn kaj televidajn agresojn kontra? Kubo, ?ar ili estas malferma perforto de la internacia juro kaj same pri la nele?a uzo de la telekomunikoj kun politikaj celoj, rekonante ke la celo ne devas esti havi influon en la kuban socion, sed

disponigi teknologiojn je la servo de la evoluo kaj scioj.”

La gazeto anka? emfazas ke “Kubo konfirmas sian pretecon dialogi respekteme kun la usona registaro kaj evoluigi rilatojn de civilizita kunvivado. Kunvivado ne signifas rezigni je la idearo en kiuj ni kredas, kiuj portis nin al la nuntempo, nia socialismo, nia historio, nia kulturo”.

?i anka? esprimas ke la “profundaj diferencoj de konceptoj inter Kubo kaj Usono pri la politikaj modeloj, la demokratio, la plenumo de la homaj rajtoj, la socia justeco, la internaciaj rilatoj, la paco kaj la monda stabileco, interaliaj, persistos”.

La artikolo anka? esprimas ke “Kubo defendas la nedivideblon, la interdependecon kaj la universalecon de la homaj rajtoj civilaj, politikaj, ekonomiaj, sociaj kaj kulturaj. Ni estas konvikitaj ke la registaroj devas defendi kaj garantii la rajton je sano, edukado, socia sekureco, egala salajro por egala laboro, la infanajn rajtojn, samkiel la rajton je nutrado kaj evoluo.

Kubo rifuzas la politikan manipuladon kaj la duoblan mezurilon pri la homaj rajtoj, kio devas ?esi. Kubo, kiu jam ali?is al 44 instrumentoj internaciaj pri tiu ?i fako, dum Usono nur ali?is al 18, havas multon por diri, defendi kaj montri.”

“?io esenca en niaj rilatoj kun Usono, estas ke amba? landoj respektu siajn diferencojn kaj kreu rilaton bazitan sur la bonfarto de amba? popoloj”.

---

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/86655-vizito-de-obama-al-kubo-respekti-la-diferencojn-kaj-krei-bonfaran-rilaton-por-ambau-popoloj

**Radio Habana Cuba**